

Heinrich Heine,
 [Ne scias mi, kio okazis]
tradukita de Paul Gottfried Christaller

El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".

Ne scias mi, kio okazis
 al mia tristema kor':
 Antikva legendo min kaptis,
 ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
 murmuras kiel mister',
 la supron ŝonegan orumas
 sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas
 mirinda sur la montet'
 kaj ŝia oraĵo radias,⁴
 ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon
 abundan per ora kombil',
 kantante misteran lidon,⁵
 ravantan kiel sunbril'.

...

Heinrich Heine,
 Lorelay
tradukita de Hans-Georg Kaiser

Min kaptas malgaj' en la koro,
 pro kio tia trist'?
 Fabel' el antikva foro
 ne lasas de mi kun persist'.

Aere fridetas, trankvilas,
 malhelas jam la Rejn'.
 La monto surpinte brilas
 vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,
 jen supre por ador';
 la ora ornamo ridas;
 ŝi kombas harojn el or'.

Ŝi kombas per ora kombilo
 kaj kantas kun pasi';
 mirigas min la elbrilo
 kaj forto de l' melodi'.

...

Heinrich Heine,
 The Lorelei
tradukita de L. W. Garnham

I do not know what it signifies.
 That I am so sorrowful?
 A fable of old Times so terrifies,
 Leaves my heart so thoughtful.

The air is cool and it darkens,
 And calmly flows the Rhine;
 The summit of the mountain hearkens
 In evening sunshine line.

The most beautiful Maiden entrances
 Above wonderfully there,
 Her beautiful golden attire glances,
 She combs her golden hair.

With golden comb so lustrous,
 And thereby a song sings,
 It has a tone so wondrous,
 That powerful melody rings.

...

⁴En la sube menciiita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Ŝipisto en sia ŝipeto
kaptiĝas per stranga dolor',
la rifon li tute ignoras.
atentas nur ĝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondoj englutas⁶
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
kaj kulpa pri tio nur estas
kantado de la virin'.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (*1860-08-21 – †1950-12-31).

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothenmel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abschnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedia retejo http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller, kun foto de li.

Ŝipisto ŝipeton gvidas,
lin kaptas ve' de ekzalt'.
Li ja la rifojn ne vidas',
li vidas nur supren sen halt'.

Mi kredas, ke ondoj tiras
la ŝipon funden de l' Rejn';
kaj tio de l' kant' eliras
de Lorelaj-siren'.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

The shipper in the little ship
It effects with woe sad might;
He does not see the rocky slip,
He only regards dreaded height.

I believe the turbulent waves
Swallow the last shipper and boat;
She with her singing craves
All to visit her magic moat.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

L. W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.